

# le monde de L'ESPERANTO

numéro  
**573**  
15 mars 2010



« Nous construisons l'Europe de demain ! » tel est le cri du cœur des 24 jeunes espérantophones venus de Bulgarie, de Roumanie, de Tchéquie, d'Ukraine et de France qui se sont rencontrés à Baugé lors de MIREGE, dans le cadre du programme européen « Jeunesse en action ».

**FOCUS**

## MIREGE, une rencontre inoubliable !

**PAGE 10**

**DOSSIER**

### Ivo Lapenna, l'exceptionnel

**PAGE 6**

- L'actualité de l'espéranto
- La vie de l'association
- Culture et voyages

espéranto  
France

## éditorial • frontartikolo

**P**lusieurs commémorations ont marqué la fin de l'année 2009 dans le monde espérantophone. Le 15 décembre, jour du cent-cinquantenaire de la naissance de L.L. Zamenhof, n'est pas passé inaperçu : le moteur de recherches Google a hissé le drapeau vert sur sa page d'accueil et des millions de personnes ont pu remarquer l'événement.



Début novembre, autre anniversaire, le centenaire de la naissance d'Ivo Lapenna. Cet éminent professeur de droit international, brillant orateur, a profondément marqué l'histoire du mouvement espérantiste et nous lui consacrons le dossier de ce numéro. Il aurait certainement aimé le sérieux avec lequel les adolescents participant à MIREGE se sont penchés sur les problèmes de la construction de l'Europe, lors du débat avec les élus locaux de Baugé. MIREGE, une belle rencontre entre jeunes de différents pays européens qui, dans le cadre du programme « Jeunesse en Action », ont, pendant une semaine, pratiqué des activités communes sans barrière linguistique. Danser ensemble, chanter ensemble, préparer ensemble une exposition et un concert, autant de démarches concrètes qui permettent la rencontre avec l'autre et la découverte réciproque des cultures. Un grand merci à ceux qui, grâce à leur persévérance et à leur ténacité, ont permis de mener à bien ce projet.

Espérons pour cette année de nouveaux projets constructifs pour notre association. Un nouveau MIREGE va avoir lieu en Bulgarie. C'est bientôt la Semaine de l'Amitié Internationale. Et si tous les citoyens du monde se prenaient par la main, comme l'ont fait les jeunes de MIREGE ?

Claude Nourmont, rédacteur en chef

**M**ulte da memorindaj datoj fine de 2009 en Esperantujo. La tago de la 150a datreveno de la naskiĝo de L.L. Zamenhof estis aparte reliefigita. La 15an de decembro, la retserĉilo Google hisis la verdan flagon en sia enirpaĝo kaj milionoj da homoj povis rimarki la eventon.

Komence de novembro, alia dato estis la 100a datreveno de la naskiĝo de Ivo Lapenna. Tiu eminenta profesoro pri internacia juro, brila oratoro, profunde stampis la historion de la Esperanto-movado kaj ni dediĉas al li la dosieron de tiu ĉi numero. Certe li ŝatintus la seriozecon de la eŭropaj adoleskuloj, kiuj en MIREGE interesiĝis pri la problemoj de konstruado de Eŭropo, dum la debato kun la lokaj instancoj de Baugé. MIREGE estis bela renkontiĝo inter gejunuloj de pluraj eŭropaj landoj kiuj, dum unu semajno kadre de la programo "Aganta Junularo" komune aktivis sen lingvaj baroj. Danci kune, kanti kune, kune prepari ekspozicion kaj koncerton, tiuj konkretaj agoj ebligas renkontiĝon kun la aliaj kaj reciprokan malkovron de la kulturoj. Dankego al tiuj, kiuj persisteme kaj obstine laboris, por ke tiu ĉi projekto sukcesu.

Ni esperu ke ĉi jare estos novaj konstruaj projektoj por nia asocio. Nova MIREGE okazos en Bulgario. Baldaŭ estos la Semajno de Internacia Amikeco. Kaj se ĉiuj civitanoj de la mondo irus man' en mane, kiel faris la gejunuloj de MIREGE ?

Claude Nourmont, ĉefredaktoro

## ACTUALITES

► Google a hissé le drapeau vert p.5

## DOSSIER

► Hommage à Lapenna p.6

## FOCUS

► MIREGE ? Mirige ! p.10

## ASOCIA VIVO

► Raporto pri prelegoj de Hori Jasuo p.15

## VOYAGES

► Memoraĵoj el Irano p.17

Revue d'espéranto fondée en 1908, éditée par Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (Tél. 09 51 77 18 33 - Fax 01 42 78 08 47 - www.esperanto-france.org) Tout (sauf réd.) : info@esperanto-france.org Bimestriel : 6 n° par an - Dépôt légal à parution  
**Tous droits de reproduction réservés**

Les opinions exprimées n'engagent que leurs auteurs et ne représentent pas nécessairement celles de l'association ou de la rédaction.

Directeur de publication : A. Kadar  
**Rédacteur en chef** : Claude Nourmont  
mondo@esperanto-france.org  
Envoi des articles 1 mois avant parution

Ont aussi participé ou contribué à ce numéro : F. Bartsch, A. Bute, G. Camy, J.M. Cash, P. Dasgupta, A. Demarque, B. Flochon, R. Fournier, E. Giovannoni, X. Godivier, Hori Jasuo, M. Houvriez, C. Hurstel, A. Kadar, J. Le Puil, F. Levêque, Miregeanoj, B. Moon, C. Pinardon, R. Sanz, D. Ševčenko, J.L. Tortel. Merci à eux !

Photos © Fondaiĝo Ivo Lapenna, Roz kaj Cirilo, Franjo, Claire Hincelin, Claude Nourmont, B.F.

Publicité/annonces : à la rédaction

Abonnement : 1 an (6 n°) : 30€ à :

Espéranto-France, CCP : 855.35 D.P.

Impression : IPPAC, Langres (52)

membre de Imprim'vert

Imprimé en mars 2010

Mise en page : Bruno Flochon

ISSN 1628-1942 - Commission paritaire : en cours

## Quinzaine de sensibilisation à la non-violence à Châteauroux



**L**a Quinzaine de sensibilisation à la non-violence était organisée par la Maison des Droits de l'Enfant et la Ligue des Droits de l'Homme et Espéranto-Indre s'est largement investie dans cette manifestation. L'association était présente aux réunions officielles pour le lancement de l'opération

et aussi dans diverses activités culturelles et sportives dont des manifestations sportives comme EKIDEN 36 (marathon par équipes), exposition sur la place de la République (9 panneaux réalisés à partir des documents reçus grâce aux espérantistes de différents pays), stand avec des jeux et

informations et bien sûr distribution de calendriers... Lors du spectacle de chansons françaises plus spécialement dédiées à l'enfance à la Maison des Loirs et de la Culture de Châteauroux, quelques membres de Espéranto-Indre ont chanté «Ekkiam regos am' sur ter» en fin de première partie, le refrain étant repris par tous les chanteurs. Très intéressée par le projet, Mireille Grosjean, co-présidente de la Société Suisse d'Espéranto et de l'Association Suisse des Educateurs à la Paix, a fait trois interventions publiques, au collège au moment habituel du club d'espéranto, en soirée tout public dans une maison de quartier où se tiennent des cours d'espéranto chaque semaine, avec une conférence-débat sur « Le mouvement de la Paix au Japon », et à l'IUT de l'Indre à Issoudun, où elle a présenté « L'éducation à une culture de Paix ».

(info. Maryvonne Houvriez)

## Une nouvelle communauté virtuelle

**Esperanto.com** beta  
virtuala komunumo

**L**es espérantophones se retrouvent sur Ipernity, Facebook et autres réseaux sociaux virtuels. Ils se rencontrent maintenant aussi sur Esperanto.com, réseau qui vient d'être créé et qui vise à réunir uniquement des locuteurs de

l'espéranto. Encore en phase d'essai, le réseau a déjà plus de 700 membres quelques jours seulement après sa présentation auprès du grand public espérantophone.

Son adresse : <http://esperanto.com/>  
(info. Dima Ševčenko)

### en bref • mallonge

#### ● MESSAGE D'IRINA BOKOVA

La diplomate bulgare Irina Bokova, nouvelle directrice générale de l'Unesco, a envoyé une lettre de remerciements à l'UEA pour le message que le président de l'UEA, Probal Dasgupta, lui a adressé à l'occasion de son élection à ce poste éminent. « La confiance que vous avez alors montrée à mon égard est une source d'encouragement dans mes efforts pour promouvoir, par des actions concrètes, les idéaux et les objectifs inscrits dans la Constitution de l'Unesco », écrit-elle.

Madame Bokova a ajouté à sa lettre le texte de son allocution lors de la cérémonie d'installation dans son poste.

Dans son discours elle a présenté sa vision sur le rôle de l'Unesco et sur les actions à mener pour répondre aux défis qu'elle devra affronter. « En acceptant ma charge, je suis très reconnaissante de savoir que je peux compter sur votre soutien ainsi que sur un partenariat durable avec l'Universala Esperanto-Asocio. De mon côté, je peux vous assurer que je ferai de mon mieux pour développer encore l'excellente coopération dont jouit l'Unesco avec votre organisation. » (UEA)

#### ● PROPOSITION DE PARLEMENTAIRES BRITANNIQUES

Huit parlementaires britanniques ont proposé l'Association Mondiale d'Espéranto, UEA, comme candidat pour le Prix Nobel de la Paix 2010. Il s'agit de Lord Robin Corbett (travailliste), Bill Etherington (travailliste), Roger Gale (conservateur), Oliver Heald (conservateur), Charles Kennedy (démocrate libéral), Lord Bob Maclennan (démocrate libéral), Austin Mitchell (travailliste), Andrew Smith (travailliste).

#### ● RICHARD VALET VIENT DE PUBLIER SON PREMIER ROMAN 'LA BOUCLE'

Tous ceux qui ont participé aux traditionnelles rencontres de Morbecque connaissent Richard Valet, qui depuis longtemps anime ces rencontres avec sa femme France. Mais il a fallu que Richard ait eu les honneurs de la presse locale à l'occasion de son premier roman, La Boucle, pour

que nous découvriions l'écrivain. Cependant ce n'est pas son premier livre... Il a d'abord écrit un petit livre sur ses souvenirs d'Algérie, puis un autre plus romancé, Le Foulard bleu, suivi par l'histoire de son père, L'Indomptable, et les souvenirs de son grand-père et d'un oncle pendant la Grande Guerre.

(d'après l'article de Jean Bischoff, La Voix du Nord, 04.12.2009)

## Google a hissé le drapeau vert !

**N**ous sommes le 15 décembre 2009. Le L de Google est devenu la hampe d'un petit drapeau vert avec une étoile verte sur fond blanc qui flotte sur la page d'accueil de Google France et d'au moins 29 autres pages d'accueil à travers le monde. De quoi surprendre les millions d'utilisateurs de ce moteur de

recherche – pas longtemps, puisqu'il suffit de cliquer sur le drapeau, pour lire ce que recouvre le symbole et même pour accéder d'emblée à quantité d'articles sur Zamenhof.

Le même jour paraissait dans Le Monde une page entière financée par Etsuo Miyoshi, mécène japonais.

La fête Zamenhof a donc eu cette fois



Programmes de publicité - Solutions d'entreprise - À propos de Google - Google.com in English

un large écho. Il est vrai qu'on n'a pas tous les jours 150 ans ! Le nombre de consultations sur lernu ! et autres sites a battu tous les records à cette occasion.

## Visite en Alsace de Probal Dasgupta président de l'association mondiale d'espéranto UEA

**I**nvité par la fédération Espéranto-France-Est, Probal Dasgupta, linguiste de l'université de Calcutta et président de l'association mondiale d'espéranto, a fait une visite de trois jours en Alsace. Une visite exceptionnelle qui a permis à la fois de développer les relations déjà nouées par Espéranto-Strasbourg avec divers partenaires locaux et d'en créer de nouvelles. Le linguiste a visité l'Institut de traducteurs, d'Interprètes et de Relations Internationales à Strasbourg et s'est entretenu avec le responsable de la section interprétation, ainsi qu'avec le responsable des recherches sur l'Inde. Des contacts ont été pris avec le vice-président et autres responsables de l'Université de Strasbourg. Puis à Mulhouse, il a rencontré Monsieur Serge Neunlist, directeur de l'Ecole Nationale Supérieure de Chimie, et Monsieur Yann Kerdiles, doyen de la Faculté de Lettres, Langues et Sciences humaines de l'Université de Haute-Alsace, où un cours d'espéranto est proposé comme UV libre aux étudiants du campus. Malgré le froid auquel est peu habitué un habitant de Calcutta, un peu de tourisme était aussi au programme. L'éminent visiteur a pu ainsi découvrir la ville d'Obernai en espéranto, en utilisant les audioguides téléchargeables

par internet et visiter le Haut-Koenigsbourg, où il a été reçu par le directeur du château.

Les membres et sympathisants de l'association ont aussi profité de cette visite pour s'entretenir avec le professeur Dasgupta de la situation économique de son pays, du développement de l'espéranto et du travail de l'association mondiale.



Probal Dasgupta devant l'entrée du Parlement européen

## La carte du «Cercle Bleu» en espéranto

L'association « Cercle bleu », mise en place avec le Professeur Christiana Barnard, est la seule, en Europe et dans le monde, à inviter les citoyens à exprimer visiblement leur choix personnel quant au prélèvement d'organes ( pour ou contre), facilitant ainsi la nécessaire décision des familles en cas d'accident mortel et réduisant, de ce fait, les délais de prélèvement. Son symbole est déjà apposé sur plus de 300 000 véhicules. Sa carte vient d'être traduite en espéranto par le

Guy Camy

CIVITA AGO		DECIDO	
<b>BLUA CIRKLO</b> Donaco de organoj al la biotikaj leĝoj		Kontraj la Donaco / Por la Donaco Organoj / Koro / Koro / Korno	
«KONTRAŬ» - aŭ - «POR» KONFORMA AL LA SPIRITO DE LA BIOTIKAJ LEĜOJ		Decido revizita kun alirajo al la ŝiparo. Nomo / Antaŭnomo / Adreso / Fariĝa je (dato) / En Subskribo (Por replenaĵoj, subskribo de la gepatroj). <b>FOR ASEKURITISAN DECIDRESPEKTON</b>	
1. Aliaj organoj 2. Antaŭfaritaj organoj		Plenskribu karton per ĉifretoj. Konservu ĉi supran karton kun via identiga karton. Polusenzi tiun karton al la pagilaro adreso. Glazu unu ensceloblaĵoj ce la antaŭajo kaj alia ce la malatentajo de la veturilo. Nomo: 5-ro 5-ino Pato	
La progreso de la transplantado de ĉi homa elemento plibonigas la vivon de la malatuloj kaj pligras la subkomprenon de la sana juro (koraco 90%, koro 80%, reno 85%, hepato 95%). Tio ĉi koncernas la volontatojn per la diversaj formoj de substanco de sono de sia.		Antaŭnomo / Naskita je / Polkodo / Urbo Profesio / Domicilefeno / Retadreso Laborlokefeno / Postlokefeno	
La decido de la alia homojn kie ne konsentas pri tiu ĉi organo fakte evigas spardojn kaj, plie, ĉiuj respondoj instigante la sciencon esploraĵojn al kreado de antaŭfaritaj elementoj.		<b>BONACO DUM VIVO</b> Deziras doni medolon. <b>POSTMORTELPRENO</b> Donaco de organoj Kontraj / Por : Donaco de Koro Kontraj / Por : Donaco de Korno Kontraj / Por : Okaze de elprenado, inskribu je la « Register National de Refuzo.	
Komputado kaj ensceloblaĵoj ghuoj de la veturilo konstruas al respekto de la decido kaj faciliga la laboron de la profesioj kaj interagas okaze de akcidento. Tia montras la gravecon de interracia konsento kaj de la diskontoj de «Cercle Bleu» - La solvo nepara uzaditaj kun la Europaparlamento, la UNESCO kaj la OMS.		<b>BLUA CIRKLO KAJ VOJSEKURECO</b> (Cirkulero de la internaj aferoj de la Franca Ministerio) Deziras ricevi informojn. Komentas kunlabori kaj diskonigi tiun informon. Donas finaschelpoj (Diskapagato ricevota en franco). Alibwicera kaj registiga rajto (leĝo n° ...)	
<b>CERCLE BLEU</b> (Biotikique - Civisme) Pré Marca		(Cirkulero de la internaj aferoj de la Franca Ministerio) Deziras ricevi informojn. Komentas kunlabori kaj diskonigi tiun informon. Donas finaschelpoj (Diskapagato ricevota en franco). Alibwicera kaj registiga rajto (leĝo n° ...)	
F-64360 MONEIN - PAU		(Cirkulero de la internaj aferoj de la Franca Ministerio) Deziras ricevi informojn. Komentas kunlabori kaj diskonigi tiun informon. Donas finaschelpoj (Diskapagato ricevota en franco). Alibwicera kaj registiga rajto (leĝo n° ...)	

Antaŭ cent jaroj naskiĝis Ivo Lapenna. Elstara figuro de la movado, brila oratoro, eminenta juristo, defendanto de la homaj rajtoj, konstruinto de la moderna Esperanto-movado. Ni dediĉas al la escepta profesoro tiun ĉi dosieron.



Prof. d-ro Ivo Lapenna en Kopenhago en 1965.

## MEMORE PRI IVO LAPENNA

**T**empo pasas kaj iom post iom malmultiĝas tiuj samideanoj, kiuj konis Profesoron Lapenna, kies centjariĝon de naskiĝo oni ĉijare festas.

Li sendube estis unu el la plej gravaj gvidantoj de la E-movado dum la 20-a jarcento. Lin tiucele helpis naturaj kvalitoj, i.a. alta staturto, fizika aspekto de filmaktoro, eksterordinara elokventeco, kiun apogis tondra voĉo, kapablo flue paroli en pluraj lingvoj (angle, france, germane, itale, ruse) kaj vastaj juraj konoj, kiuj subtenis lin en liaj bataloj por la akcepto de Esperanto en la tiamaj internaciaj rilatoj.

Tre konata estas lia atingo en Montevideo en 1954, t.e. la rekono de UEA kiel asocio en «Konsultaj Rilatoj» kun Unesko. UEA jam preparis la

terenon per vasta peticio subtenita de milionoj da homoj, miloj da universitatuloj, centoj da parlamentanoj, pluraj ĉefministroj kaj eĉ unu ŝtatestro. En novembro-decembro, la Ĝenerala Konferenco de Unesko devis pridiskuti la temon. La oficiala rakonto aperas en *Esperanto en perspektivo*, p. 760-773.

### Ili tre efike tamburis en la koridoroj la gurdan refrenon de la senkultureco kaj senvaloreco de Esperanto

La realo, pli suka, estas nur tuŝita en tiu teksto. Kiel kutime en tiaj aranĝoj la gravaj eventoj diskrete okazis ekster la kunvenoj kaj la premo de la E-kontraŭuloj estis tre potenca. Inter ili du danoj, Prof. Nielsen kaj Prof. Blinkenberg tre efike tamburis en la koridoroj la gurdan refrenon de la senkultureco kaj senvaloreco de Esperanto kaj la aserton, ke peticio ne havas gravan signifon. «Homoj subskribas iun ajn peticion, se ties peto estas afable prezentata». Subtenate de la loka esperantistaro kun du universitataj profesoroj, Lapenna malfacile provis rezisti al tiu malestima etoso per

digna reveno al kulturaj temoj kaj ĝis la lastaj tagoj, kiel li rakontis al mi, estis pesimisma. Sed la malamikoj faris unu puŝon troan. Kelkajn tagojn antaŭ la fina decido de la deka de decembro, Blinkenberg aŭdacis publike deklari en komisiono, ke Esperanto eble sufiĉus por peti lokajn manĝaĵojn en montevideaj restoracioj, sed neniel kontentigus en aliaj temoj. Ĉiuj ĉeestantoj ridis kaj la loka esperantistaro senesperis.

Tiam alia kapablo de Lapenna, malpli konata, ŝprucis. Lia baza profesio estis advokato. Tuj post la lasta mondmilito li estis sukcese pledinta en grava interŝtata afero inter la brita kaj la albana registaroj (konflikto pri navigo-rajto proksime de la albana marbordo).

### Ne lamentu, sed spronu al la lokaj gazetoj kaj radiostacioj, agitu ĉiujn ĉeestantojn

Kiel bona advokato li en Montevideo tuj trovis el tiu mokado pretekston de kontraŭatako. Li rakontis al mi ke li ordonis al la lokaj samideanoj « Ne lamentu, sed spronu al la lokaj gazetoj kaj radiostacioj, agitu ĉiujn ĉeestantojn, alarmu ilin kontraŭ tiu

### En préparation, les prochains dossiers

LME 574 : Esperanto en Sudameriko

LME 575 : Esperanto, peranto inter kulturoj

Envoyez vos contributions à  
mondo@esperanto-france.org

senrespekto al la urugvaja gastamo kaj tra ĝi al la tuta Urugvajo ! Tiun atencion aŭdacas homoj, kiujn urugvajanoj amikece akceptas hejmen kaj kiuj dankeme krude ridindigas ilian kuirarton, do ilian vivmanieron, do ilian kulturon kaj sekve la tutan popolon de Urugvajo !».

## Helpe de la popola kolero Esperanto venkis kelkajn tagojn poste

La rezulto estis tuja, la morgaŭon ĉiuj montevideaj gazetoj protestis, ke hontindaj gastoj mokas la akceptantan landon. Ĉiuj urugvajanoj indignis kaj la blinkenberga fispritaĵo retrobate trafis lin mem. La delegitoj turnis la dorson al la dana profesoro, multaj ne plu aŭdacis aliri lokajn restoraciojn pro timo kontraŭ krudaj alparoloj kaj helpe de la popola kolero Esperanto venkis kelkajn tagojn poste.

## Kiu alia tiama defendanto de Esperanto kapablas tiun lertaĵon ?

Tiel justa afero venkis per flanka, neatendita, iel ekstertema kaj tipe advokateca kontraŭbato ! Lapenna kiel ĵudoluktisto transĵetis la tro memcertan Blinkenbergon malantaŭen super sia



Prof. d-ro Ivo Lapenna surŝipe inter Britio kaj Nederlando en 1961.

kapo. Kiu alia tiama defendanto de Esperanto kapablas tiun lertaĵon ?

Por kelkaj, la Lapenna-komandemo kelkfoje tanĝis diktatorecon kaj lia memŝato orgojlon. Oni povas respondi, ke je tiel alta nivelo liaj kvalitoj eble proksimis al troeco, sed ke tamen en la stato de amatoreco, en kiu sin trovis la tiama esperantista movado, danke al li la pesilo fine ege pozitive balancis.

Unu stelo bedaŭrinde ne faras astraron kaj ni bezonus multajn Lapenna-ojn por venki la hipokritan malŝatemon de potenculoj al nia idearo, rekte kontraŭa al iliaj kaŝitaj interesoj. Ĉu estonteco iam donacos tian konstelacion al ni?

Johan'-Luko


## POŝTMARKO PRI IVO LAPENNA

**P**or omaĝi la 100-an datrevenon de la naskiĝo de Ivo Lapenna, UEA mendis poŝtmarkon kun la portreto de sia eksprezidanto. La nova marko estis lanĉita en la naskiĝtago de Lapenna, la 5-an de novembro kaj ĝia nominala valoro egalas al tiu de la enlanda afranko por letero ĝis 20-grama en Nederlando.

La poŝtmarko estas vendata en folioj kun 10 markoj, mendeblaj ĉe la Libroservo de UEA. Unu folio kostas EUR 5,50 (plus afranko; kvanta rabato ne estas aplikebla).

En 2009 aperis ankoraŭ dua poŝtmarko, kiu omaĝas la 150-an naskiĝdatrevenon de L.L. Zamenhof. Ĝi estis lanĉita en la Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA la 28-an de novembro. Ankaŭ la Zamenhof-marko aperos en 10-markaj folioj kaj ĝiaj vendokondiĉoj estos samaj kiel tiuj de la Lapenna-poŝtmarko.

(laŭ GK de UEA 346)



# Por pli bone konatiĝi kun Ivo Lapenna

**L**a vivo kaj verko de Ivo Lapenna estis temo de la 31-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA sabaton, la 28-an de novembro. Tiu ĉi populara aranĝo okazis tri semajnojn post la 100-a naskiĝdatreveno de Lapenna (1909-1987) kaj allogis 120 vizitantojn el 16 landoj. S-ino Birthe Lapenna ĉeestis la Tagon kaj ricevis kiel memoraĵon enkadrigitan folion kun 10 poŝtmarkaj portretoj de sia edzo, « por rekompenci kun rento la portreton, kiun ŝi donacis al la Centra Oficejo en la Malferma Tago en aprilo 1998 okaze de la 90-jariĝo de UEA », klarigis la ĝenerala direktoro Osmo Buller.

La ĉefpreleganto estis prof. Carlo Minnaja, prezidanto de Internacia Scienca Instituto Ivo Lapenna. Li parolis en du partoj pri siaj renkontiĝoj kun Lapenna, kiun li, denaska esperantisto, ekkonis kiel juna knabeto, ĉar Lapenna ofte gastis en la familio de la famaj italaj esperantistoj Luigi kaj Carolina Minnaja. Sian prelegon Minnaja ilustris per fotoj kaj filmfragmentoj. Poste la kontaktoj daŭris ankaŭ kiel movada kunlaboro, i.a. kiam Minnaja estis estrarano de TEJO kaj eĉ anstataŭis Lapenna kiel festparolanto en la unua Tokia UK. Li montris ankau la Pokalon Ivo Lapenna, konservatan en la CO, sur kiu lia nomo estas gravurita kiel la unua post lia venko en la Oratora Konkurso en 1960. Ankaŭ iam venkis en la Oratora Konkurso la sekva preleganto, prof. Duncan Charters kaj ankaŭ lia



**La prezidanto de UEA, Prof. d-ro Ivo Lapenna. Oficiala foto de UN okaze de la transdono de la Propono favore al Esperanto al la Sekretariato de UN en New York la 6-an de oktobro 1966.**

nomo aperas sur la pokalo. Li parolis pri siaj kontaktoj kun Lapenna kaj kiel vicprezidanto de ILEI, li aparte elstarigis la atenton de Lapenna al la lerneja agado, i.a. kiel iniciatinto de serio da Internaciaj Lernejoj Konferencoj kaj Esperanto. Ankaŭ li substrekis liajn klopodojn por seriozigi la informadon kaj dokumentadon pri Esperanto.

Tiuj prelegoj estas spekteblaj en la reta kinejo de UEA ĉe [www.ipernity.com/doc/97850/home/video](http://www.ipernity.com/doc/97850/home/video).

Aldone ĉe la reta kinejo vi trovos valorajn historiajn dokumentojn, ekz. scenojn el la Budapeŝta UK en 1966, i.a. kun fragmento el la festparolado

de Ivo Lapenna, montras la filmo «Esperanto-fonto». Ankaŭ fragmentojn el lia festparolado en la inaŭguro de la 55-a Universala Kongreso de Esperanto en Vieno en 1970 spekteblas en duonhora dokumenta filmo de la dana filmisto Erik Elias. La adreso de la reta filmjurnalo en Youtube estas [www.youtube.com/user/UEAviva](http://www.youtube.com/user/UEAviva) kaj tiu de la reta kinejo en Iperity [www.ipernity.com/home/97850](http://www.ipernity.com/home/97850).

La voĉon de la eminenta oratoro vi povas ankaŭ aŭskulti en serio de 5 diskoj kun entute 10 prelegoj. Ilin eldonis la fondaĵo Ivo Lapenna, ĉe kies retpaĝaro [www.ivolapenna.org](http://www.ivolapenna.org) estas aldone listigita kvardeko da DVD-filmoj kun paroladoj de Ivo Lapenna, atingeblaj ĉe Youtube. Multe da aliaj informoj historiaj kaj dokumentaj aperas ankaŭ ĉe tiuj paĝoj.

Inter la libroj verkitaj de Lapenna mem, elstaras *Retoriko kaj ĝia suplemento Elektitaj paroladoj kaj prelegoj* ĵus reeldonita de UEA.

Kaj plej rekomendindaj pri Lapenna estas *la Eseoj memore al Ivo Lapenna*, kiun redaktis la ĉefpreleganto de la malferma tago Carlo Minnaja. Ĝi prezentas vidpunktojn de 29 konataj aŭtoroj kiuj kontribuis al tiu ĉi tre interesa libro.

(Fontoj : Gazetaraj Komunikoj de UEA 342, 349 kaj 354, kaj retpaĝoj de Fondaĵo Ivo Lapenna)



## Message du président de l'UEA

**L**e professeur Ivo Lapenna (1909-1987), dont nous fêtons le 5 novembre 2009 le centenaire de la naissance, a sans doute été la plus éminente personnalité du mouvement espérantiste organisé. On rattache souvent sa carrière tout spécialement à l'UEA, qu'il a fait évoluer vers sa structure institutionnelle actuelle. Mais sa contribution au mouvement débordait les limites de cette organisation.



### Le plus brillant orateur de l'histoire de l'espéranto

Lapenna fut le plus brillant orateur de l'histoire de l'espéranto. Son ouvrage *Retoriko* (Rhétorique), qui enseigne l'art de la persuasion oratoire, se range parmi les classiques du genre dans toutes les langues. Ses discours restent un modèle que continuent à écouter les générations successives. Son succès à Montevideo en 1954 n'a pas été seulement celui de l'UEA, qu'il représentait mais aussi celui de l'éloquence, seule arme tolérée dans les rudes joutes en faveur de la paix. Il a profondément œuvré, non seulement pour faire accepter et renforcer une méthode démocratique, mais encore

pour promouvoir l'art de la rhétorique et développer la capacité des actifs à l'utiliser efficacement. Certains d'entre nous ne se souviennent pas assez qu'il a aussi beaucoup travaillé à l'évolution de la langue. Le grammairien Ivo Lapenna a participé avec compétence et fermeté avec d'autres grammairiens au Symposium sur *ata/ita* organisé par les éditions Stafeto.

### Il a modelé la stratégie de l'UEA d'après-guerre

Mais il appartenait aussi à un tout autre monde. Eminent spécialiste de droit international, il a sur la base de cette compétence modelé la stratégie de l'UEA d'après-guerre. Son engagement sur le terrain des droits de l'homme a non seulement créé un nouveau profil pour l'UEA, mais aussi pour tout le mouvement espérantiste après le conflit mondial. L'UEA, sous son impulsion, avait déjà inscrit dans ses statuts dès 1947, soit un an avant l'adoption formelle de la Déclaration Universelle des Droits de l'Homme par les Nations Unies, qu'elle considérerait le respect de ces droits comme un préalable indispensable à toute action. Les générations actuelles devraient attacher une grande importance à ce qu'il ait été l'un des premiers à prendre part à la lutte pour la sauvegarde des langues et des cultures minoritaires et qu'il ait introduit dans ce combat la notion de génocide culturel.

### Il a plaidé en faveur de l'espéranto comme solution équitable au problème des langues minoritaires

Sous cet angle juridique, il a analysé la géopolitique linguistique et, sur cette base, a plaidé en faveur de l'espéranto comme solution équitable au problème. Les principes de cette analyse sont



Prof. d-ro Ivo Lapenna eldiras la Inaŭguran Paroladon dum la 3-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado en Humlebæk, Danio en 1977.

mieux reconnus aujourd'hui, alors que sur la scène mondiale, les valeurs éthiques prennent le pas sur des considérations purement pragmatiques et que les voix des organisations non gouvernementales porteuses de ces valeurs morales, parfois en opposition avec des systèmes étatiques ne tenant pas compte de ces valeurs, se renforcent dans les institutions internationales. En un moment si important de ce jubilé, je ne veux pas me borner à l'évocation de la seule carrière au sein de l'UEA d'un personnage d'une telle stature dans le champ interlinguistique mondial. Me limiter à l'UEA donnerait le sentiment que nous voudrions nous l'approprier. De LPLP (qui à l'époque de Lapenna s'appelait «La Monda Lingvo-Problemo»), Le problème linguistique mondial) jusqu'à la série éditoriale «Oriento-Okcidento» (Orient-Occident), du concours de rhétorique dans nos congrès jusqu'à l'Office central d'UEA à Rotterdam, une telle richesse créative sur le terrain de notre association atteste ses talents de bâtisseur. Mais je préfère ne pas aborder ce domaine et laisser les espérantistes de toutes convictions applaudir au souvenir d'un homme qui nous a donné tant de raisons de le faire. Il fut l'un des très rares pour lesquels nous pouvons affirmer en chœur «Le monde changera et le temps passera, mais leur grand souvenir toujours nous restera.»

Probal Dasgupta, Président de l'UEA  
(traduction de Johan-Luko)



# Mirege ? Mirige !

**P**artopreninte la projekton MIREGE 2009 (Muzika Internacia Renkontiĝo de Esperantistaj Gejunuloj Eŭropaj) en la urbo Baugé (Francio), mi volas dividi kun vi mian ĝojon!

Kuniĝis en Baugé 24 gejunuloj kun 6 akompanantoj el 5 landoj (Bulgario, Ĉeĥio, Francio, Rumanio, Ukrainio) sub la gvido de Franjo Leveque kaj Guy Martin, inter la 24-a kaj la 31-a de Oktobro.

La programo estis riĉa, interesa kaj alloga, ne estis tempo por enuiĝi.

André (Belgio) gvidis kurson pri Van Gogh, laborigante la junulojn tiel, ke en la fino de la kurso ĉiu grupo prezentis pentraĵon de Van Gogh, priskribante ĝin kaj klarigante la kialon pro kiu ili elektis la verkon.

Franjo lerte gvidis la kantadon, ni lernis kantojn internaciajn, surbaze de partituroj, kun piana akompanado.

Ĉiun tagon unu lando prezentis sin per mapoj, bildoj, popolaj kantoj kaj dancoj, teatraĵoj antaŭpreparitaj, la prezentado finiĝis per dancigo de la aliaj partoprenantoj.

En la sama Muzika Centro, staĝis pri muziko grupo de 65 geknaboj francaj, kun kiuj ni bone kunlaboris. Ni donacis al ili ĉiuj la konatan Poŝamikon, ili kun intereso akceptis Esperanto-kur-



setojn de Franjo, tiel ke dum la tago, ofte aŭdiĝis *Saluton!* en la koridoroj. Okazis oficiala akcepto ĉe la urbestro kaj debato inter la urbestro kaj distrikta konsilantino unuflanke kaj la gejunuloj aliflanke. La temo estis *Ĉu ni havas samajn rajtojn kaj ŝancojn en la kontruota Eŭropo?* La demandojn starigis la gejunuloj, ili multe laboris por tio kaj ni, la plenkreskuloj, devis elekti po unu demandon por ĉiu lando. La urbestro kaj konsilantino respondis dum unu horo kaj je la fino ili rimarkis ke la demandoj estis profundaj kaj pritraktis tre seriozajn aferojn de la nuna Eŭropo.

Ni vizitis la kastelon de Baugé, kie la gejunuloj vidis arton mezepokan, la ornamo de majuskloj komencantaj tekstojn, paragrafojn. Ili mem pentris drakon per naturaj de ili mem preparitaj farboj.

La lastan tagon okazis spektaklo en la urbodomo, ĉeestis loĝantoj kaj esperantistoj de Baugé, la lokaj instancoj, inter ili la urbestro. La francoj kantis kaj dancis, ni – la esperantistoj – kantis la melodiojn, kiujn ni lernis dum la kantado kun Franjo, kelkfoje la francoj akompanis nin per instrumentoj, kelkfoje ni kantis kune, en Esperanto. Poste oni prezentis la esperantistajn grupojn, kiuj dancis sinsekve (Ĉeĥio, Rumanio, Bulgario) kaj fine, ni dancis la tutan ĉeestantaron. André donacis al Franjo belegan florbukedon, kiel dankon pro la granda ŝia laboro por estigi MIREGE. Aliaj dankoj sekvis kaj reveninte en la Muzikan Centron ni ĉiuj gustumis festan kukon, poste dancis kune kun la

francoj. Vespere malfrue, ni surprizis Franjon per komune subskribita tuko, sur kiu Gretel kaj Iona (francinoj) gluis literojn: DANKON, FRANJO! Ni kune kantis por ŝi, Manolo (Francio) deklamis poeziaĵon honore al ŝi, Franjo ploris pro emocio, sed ĉio finiĝis per ĝoja komuna dancado.

En la fino de MIREGE, ni ĉiuj konstatis ke la parolkapablo de la gejunuloj multe progresis dum la semajno kaj, juĝante laŭ la larmoj lastatagaj, la etoso estis tre bela, estiĝis amikaj rilatoj, per retmesaĝoj daŭros la interŝanĝoj inter la geknaboj.



**Aurora Bute transdonas donacojn al la urbestro de Baugé, samtempe transdonante inviton pri ĝemeliĝo kun rumana urbeto.**

MIREGE estis bonega varbado por Esperanto! Eksciis pri la Internacia Lingvo la lokaj instancoj, la loĝantoj, la franca televido (kiu prezentis nian semajnan agadon), la francaj geknaboj staĝantaj en la Muzika Centro kaj iliaj instruistoj. Eĉ la direktorino de la Centro salutis nin kaj iom paroletis esperante!

Okazis belega interŝanĝo inter la grupoj, ĉiuj prezentis sian kulturon kaj ĝoje instruis al la aliaj naciajn dancojn kaj kantojn. Mi devas konfesi ke, dum mia esperanta vivo, mi partoprenis multajn E-aranĝojn, sed neniu estis tiom bunta, instrua, plena je interesaj agaderoj! Laŭ mi, malfacile oni povas organizi same riĉan E-eventon !

Dankegon al Franjo kaj Guy pro iliaj grandaj laboro, zorgo, intereso kaj strebo !

MIREGE 2009 finiĝis, vivu MIREGE 2010 !

Skribis Aurora Bute, kiu akompanis la rumanan grupon.

## Pri Mirege 2009

**L**aŭ la bilanco farita de la gejunuloj de MIREGE, sabaton la 31an de oktobro 2009, MIREGE 2009 estis granda sukceso. Pri tiu renkontigo ili longtempe memoros. Mariana el Bulgario pretas organizi MIREGE 2010 per sama eŭropa subvencio se eblas.

23 gejunuloj el Bulgario, Ĉeĥio, Francio, Rumanio, Ukrainio kaj iliaj akompanantoj partoprenis tiun internacian artan esperantistan renkontiĝon por gejunuloj. Bedaŭrinde, lastmomente grupoj de Italio kaj Slovenio rezignis pri partopreno.

Samsemajne, 65 junaj francaj muzikistoj ĉeestis kaj muzikumis en la muzika centro de Baugé, kiu gastigis MIREGE.

Ĉiun matenon, André Demarque el Bruselo malkovrigis al la « Mirantoj » vivon de Vincent Van Gogh pere de ludoj, puzzleoj, anekdotoj, teatraĵoj. Karbonkrajonojn ili uzis sub konsiloj de André por kopii plurajn pentraĵojn de Van Gogh kaj ekpoziciis ilin por la loĝantaro de Baugé. Fine de la mateno okazis kantado por ĉiuj.

Pluraj grupoj kunportis tekstojn de populaj kantoj por prepari internacian kantprogramon kiun ni prezentis la 30an de oktobro en la festa salono de Baugé. Ankaŭ la junaj muzikaj staĝanoj partoprenis tiun koncerton, ĉu por esperante kanti, ĉu por muzikinstrumente akompani esperantan koruseton. Do Eŭropa estonteco, civitaneco kaj identeco kune

sursceniĝis.

Posttagmeze, post libera tempo, estis elekteblaj diversaj ateleroj, i.a. teatraĵoj, eksteraj ludoj, dancoj, ktp.

Ĉiuj rendevuis fine de la posttagmezo por malkovri unu landon, ĝiajn tradiciojn, kuirreceptojn, iom pri la historio de la lando kaj fine dancojn.



### Gravaj momentoj

1. Akcepto de la urbestro

*...La ville de Baugé est très heureuse d'accueillir cette rencontre espérantiste (...) l'espéranto est porteur de valeurs et de symboles dans lesquels les Baugeois se reconnaissent parfaitement. En ces moments où l'Europe des peuples tente de créer une véritable Europe politique, l'espéranto nous semble être un vecteur possible du rapprochement des peuples européens...*

*...la urbo Baugé feliĉas akcepti tiun ĉi esperantan renkontiĝon (...) la lingvo Esperanto portas valorojn kaj simbolojn en kiuj la Baugé-regiono ja sin rekonas. Nun, kiam Eŭropo de la popoloj provas krei veran politikan Eŭropon, la espe-*

*ranta lingvo aspektas kiel ebla portilo por alproksimigi la europajn popolojn...*

2. La debato kun politikistoj de Baugé

La 5 partoprenantaj grupoj delegis po unu reprezentanton por alparoli la urbestron kaj regionan konsilianinon. La temo preparita de la gejunuloj estis « ĉu ni havas

la samajn ŝancojn kaj rajtojn en tiu konstruota Eŭropo ? » kun la jenaj demandoj :

- Ĉu Eŭropo povus akcepti komunan lingvon, se jam ekzistas nur unu valuto ?

- Kiam Eŭropo proponos saman protektadon por helpi la senlaborulojn ?

- Ĉu eblas harmoniigi la leĝojn inter la eŭropaj landoj ?

- Kiam samvaloreco de la diplomoj estos rekonata ?

- Ĉu Eŭropo pliriĉiĝos kun eniro de Ukrainio ?

Ili kune konkludis per « Ni ege deziras pli justan, pli verdan, pli esperantistan Eŭropon ».

3. Iluminaĵoj ĉe la kastelo de Baugé

Artistino de la regiono instruis al la tuta grupo kiel prepari pigmentojn kaj pentri drakon. Dum du horoj kaj duono, ili atente kaj diligente ekzerciĝis pri tia artaĵo.

4. « Boule de fort »

Tiun ĉi tradician lokan kegloludon ili malkovris kaj spertis en la ludejo « l'Union » de Baugé.

5. Unuan vesperon, kiam ili interkonatiĝis kaj konstatis ke esperanto jes ja funkcias kaj ke ili komprenas unu la alian.

6. Du komunaj vesperoj kun la muzikaj staĝanoj.

Bulgara kaj rumana grupoj dancigis ĉiujn kaj muzikistoj akompanis la 90 junajn kantistojn, kiuj esperante kune kantis rusan kanton.

Franjo Levêque-Provost

### La gejunuloj plej ŝatis...

Ludi homlupon, kanti kaj danci kun alilandanoj, paroli en Esperanto kun la miregaj gejunuloj, teatri, pentradi, manĝi la alilandajn specialaĵojn kaj la spektaklon vendredan por la loĝantaro de Baugé kun la infanoj de la Muzika Centro.

Iuj bedaŭris, ke ili ne povis partopreni la laboron sur la blogo kun Mariana, ne ŝatis, ke estas komunaj duŝoj... Sed ili plej malŝatis... kiam MIREGE finiĝis.

# Kiel taksi kaj plibonigi MIREGE ?

Jen la vidpunktoj de la akompanantoj.

**M**i pensas, ke miaj knabinoj sufiĉe bone konis la «teorion» kaj ili bezonis la partoprenon en simila renkontiĝo por ekuzi la lingvon. MIREGE plibonigis la lingvokonojn de la partoprenantoj, helpis al ili ekkoni unu la alian, ili jam havas bonajn amikajn rilatojn, kiuj daŭras nun, post la projekto. Multaj komencis korespondi kaj tio estas bona rezulto, ĉar ili fakte daŭrigas la celon por la eŭropaj interrilatoj kaj civitaneco, amikecon inter la junulojn.



Mi tamen timas, ke la akompanantoj, kiuj ne interrilatis kun la aliaj antaŭ la renkontiĝo, ne interrilatos nun, post ĝi kaj tio malhelpos la laboron de la gejunuloj. El alia lando akompananto kritikis : Estis tro profunda aktivaĵo pri Van Gogh. La temo estas iom specifa. Laŭ mi, necesus uzi diversajn temojn, por la gejunuloj estus pli interese. Eble proponi samtempe du temojn por ke la gejunuloj havu elekton. Estis bonege lerni koncertajn kantojn kun Franjo, sed mi proponus uzi por komuna kantado ankaŭ la simplajn, kiujn mi nomas «ĉefajrajn kantojn».

Kaj alia akompananto atentigas : Unue, en venonta renkontiĝo, devos partopreni gvidantoj, kiuj scias KIAL ili partoprenas en tia projekto. Ili devus celi verajn amikajn interrilatojn antaŭ, dum kaj post la renkontiĝo. La akompanantoj ne devas nur atendi la renkontiĝon

mem, sed labori por organizigi ĝin. La junuloj, kiuj partoprenos devos interesiĝi pri la komuna lingvo por komunikado, devas havi imagon kio okazos dum la renkontiĝo, kaj kiamanierere ili mem povos plibonigi la aferojn dum la semajno. Antaŭ la renkontiĝo ili devos labori pli por prezenti sin kaj sian landon, kutimojn kaj vivmanieron. [NdLR: okazis preparkunveno en Baugé fine de aŭgusto sed bedaŭrinde nur malmultaj respondeculoj partoprenis ĝin.]

Tamen, la gejunuloj bonege interrilatis inter si dum la renkontiĝo kaj estis bela etoso dum la semajno. Spite al krokodilado, ili strebis paroli la internacian lingvon kaj multe progresis post unu semajna kunesto, ktp. Sabate matene, gejunuloj interŝanĝis adresojn kaj disadiaŭis kun novaj geamikoj larmante.

Kaj ĉu resti ĉe la konkludo, MIREGE 2009 estis tiom riĉa kaj abunda, ke malfacile oni povas pensi pri pli bona venonta MIREGE.

La organizonta skipo de MIREGE 2010 estas vere kuraĝa.

## Mirinda MIREGE

**Ĉ**armaj kaj graciaj junulinoj, folklore vestitaj, kiuj dancas kaj kiuj ridetante prenas vin per la mano por inviti vin danci kun ili. Tio estas la ĉefa memoraĵo de la mirinda semajno, kiun mi pasigis en Baugé, fine de oktobro. Plurfoje vespere, ni ludis la homlupo-ludon, sed dum la tuta restado ni renkontis ĉie junajn sorĉistinojn, alvenintajn de orienta Eŭropo. Cetere estis ankoraŭ simpatiaj knaboj kaj simpatiaj francoj.

Mi estas juna (en mia kapo, ĉar mi estas pensiulo). Mi estas juna esperantisto (mi ekesperantiĝis nur antaŭ 5 jaroj). Mi partoprenis multajn esperantistajn renkontiĝojn, loke kaj internacie (i.a. la UKojn). Sed ofte, la Esperantistoj estis tiel «junaj» kiel mi kaj iafoje mi estis unu el la

plej junaj. Certe, multaj estas tre agrablaj homoj kaj viglaj, kaj energiplenaj. Sed tiu renkontiĝo kun 12-jaraj ĝis 18-jaraj gejunuloj donas tute alian bildon de Esperantujo. Tia renkontiĝo estas mia plej agrabla sperto kiel esperantisto. Tiuj gejunuloj estas la estonteco de Esperanto.

Mi ankaŭ konatiĝis kun la akompanantoj kaj gvidantoj. Bela ekzemplo de diverseco de kulturoj, de vivmanieroj, de perceptoj pri la aferoj. Tio estis ankaŭ

riĉeco, sed donis al Franjo, nia miregestrino, multajn plezurojn kaj... zorgojn. Kelkaj el ili tre impresis min.

André Demarque (Belgio)



# Komparo inter Eŭropa Junula Parlamento kaj MIREGE

**M**i ege volas danki la Miregajn partoprenantojn kaj ĉefe la organizantojn pro ilia seriozeco kaj kompetento. Ŝatis mi kanti, desegni, lerni pri la vivo de Van Vogh... Ne eblis enui en MIREGE ! Eble mankis pli da libera tempo au interlanda teatrado, sed mi opinias, ke ni kune ĝojis paroli, vivi en la sama esperantokultura etoso.

Mi nun volas diri al vi mian propran anekdoton pri pasintecaj renkontiĝoj de EJP (Eŭropa Junula Parlamento), kiuj ege similas kun MIREGE, sed kun gravaj malsamaĵoj.

EJP estas por ĉiuj gejunuloj, sed fakte nur la liceanoj kun bona angla nivelo povas vere bone partopreni.

Oni dum tiu semajno renkontas aliajn eŭropanojn kaj oni angle parolas. Oni renkontas ankaŭ gravajn oficialulojn kiel urbestron aŭ regionajn kaj eŭropajn parlamentanojn.

Oni dum horoj sidante pridiskutas eŭropajn problemojn, kiel etikajn, ekono-



mikajn, politikajn problemojn, ekzemple pri klonoj, drogoj, GMO, la troa multilingveco de EU, ktp.

Oni ludas kune por interkonatiĝi (anglaj kanzonoj, «teambuilding» t.e grupokonstruado) kaj oni ankaŭ laboras kune por defendi siajn vidpunktojn.

Finfine unu el la partoprenantaj landoj gajnas ĉar la ĵurio trovas ĝiajn sintenon kaj respondojn la plej bonajn el ĉiuj partoprenantoj. Oni poste adiaŭas kaj ĝis la proksima renkontiĝo. Rimarkas ni, ke la himno de la EJP estas «Imagine» de John Lennon, kun emocia vizaĝo preĝu... Do, vivu la lingva egaleco !

En MIREGE, tute alia etoso, tute ne serioza konkurado, sed oni vere amikiĝas

kun alilandanoj, ni povas paroli pli profunde, pli klare... Kaj oni ne timas fari gravan eraron kiel «I'm agree with you» au paroli «kun francan akcenton».

Ni povas vere esti ni, nia lando ne plu estas pezo sed riĉeco.

Dank'al MIREGE, ni ne nur proponas al EU junulajn vidpunktojn pri EUaj problemoj, sed ni konstruas vere la hodiaŭan Eŭropon. Ni ne proponas, ni faras.

Do, pripensu ke la faktoj estas ĉiam pli gravaj ol la paroloj. Ni povas fieri ĉar per Mirege ni estas la estonteca, egaleca kaj justa Eŭropo. Ni estas, kiel diris la urbestro de Baugé, la morgaŭa Eŭropo.

Manolo

## Kelkaj vortoj de...

Damien Guilbaudeau, jeune encadrant de MIREGE.

« Une première expérience inoubliable de l'utilisation de l'espéranto... une semaine entière consacrée à la découverte de chacun, de chaque culture, dans une ambiance décontractée... »

Le fait de ne parler espéranto que depuis un an et demi ne m'a nullement empêché de tisser des liens d'amitié forte envers tous les participants et les accompagnateurs. Je craignais de ne pas comprendre ou de ne pas me faire comprendre, c'est l'inverse qui s'est produit car cette rencontre m'a même permis d'améliorer fortement ma connaissance de la langue.

Dès la fin de MIREGE, une seule envie, repartir pour de nouvelles aventures dans d'autres rencontres internationales, en France mais surtout dans le monde.

Un grand merci à Franjo qui m'a fait confiance pour encadrer ces jeunes espérantistes et merci à tous ceux qui ont

contribué au succès de cette rencontre. C'est grâce à des stages comme celui-ci que l'on tisse des liens forts entre habitants de la même planète. »

Andreea, el Rumanio.

« Kiam mi audis pri la projekto MIREGE, mi tute ne imagis ĝin tia, kia ĝi estis! La sperto kiun ni travivis neniam povas ripetiĝi. Estis tre bele kaj mi asertas tion ne pro la fakto ke ĝis nun mi neniam partoprenis tian aranĝon, sed pro la fakto ke vere estis io unika kaj aparta. Mi gardos la kontakton kun la partoprenintoj. Mi renkontis tie tre agrablajn personojn, kiel Franjo kaj Guy, sed ankaŭ gejunulojn, samaĝajn kiel mi, kiuj ŝanĝis mian fuŝan opinion pri la vivo en Okcidento. Mi estas dankema pro la ŝanco partopreni tian projekton, precipe al nia akompananto Aurora Bute, sed ankaŭ al miaj amikinoj de la rumana skipo. MIREGE estas eksterordinara projekto por adoleskantoj kaj mi deziras ke ĝi kresku, ripetiĝu dum jaroj kaj grandiĝu la nombro da partoprenantoj. »

Interasocia informado

# SAT-Amikara Kongreso en Hiliono (apud San-Briego)

**Bretonio (Francio), de la 3a ĝis la 6a de aprilo 2010.**

**L**a venonta SAT-Amikara Kongreso okazos en Hiliono (apud San-Briego) en Bretonio de la 3a ĝis la 6a de aprilo 2010. La klubo Esperanto 22 ĝin organizas kaj invitas vin.

Ni debatos pri temoj rilate al nia medio kaj la nunaj krizoj :

- la estonteco de la abeloj,
- la kvalito de la akvo en Bretonio kaj aliloke,
- la eblaj solvoj, eblaj rimedoj por kriz-kontraŭi ,
- « Louis Guilloux la nesubiĝinto », engaĝiĝema pensisto kaj verkisto de San-Briego. La du kinisto-filmistoj partoprenos la debaton kun proponota surprizo al la publiko. Ni planis ankaŭ kulturan programon pere de diversaj esprimoj :
- Gijomo pianludos kaj kantos siajn memverkitajn kanzonojn pri naturo, amo kaj medio,
- Mervili, bretona muzikgrupo,

dancante bonvenigos la partoprenantojn,

- Lino, kontentigos nin per gitarkoncerto (renesanca, baroka kaj nuntempa muzikperiodoj),
- La interregiona koruso « Interkant' » denove prezentos famkonatan freskon de Pablo Neruda kaj Mikis Theodorakis, la « Kanto Ĝenerala»-n kun gesolistoj kaj orkestro,
- La teatra trupo de Vannes konkludos la artan programon prezentante « La atendejo »-n, spektaklon por aktoroj kaj kantistoj.

Por sin aerumi, ni malkovrigos al vi nian tipan regionon, ĉu la rozgranita marbordon, ĉu historian urbon Dinan, San-Briegon kaj la famkonatan esperantan urbeton Pluezeko, ktp.

Vizitu nin, la nesubiĝintajn gaŭlojn kiuj gastigos vin, kongresantojn de « Armor 2010 ».

Por pliscii, vizitu [www.esperanto-sat.info](http://www.esperanto-sat.info).

## en bref ● mallonge

### ● NOVAĴOJ DE FRANCA ESPERANTO-INSTITUTO

La membroj de Franca Esperanto-Instituto, instituto komuna al SAT-Amikaro kaj Unuiĝo Franca por Esperanto, kunsidis la 25-an de oktobro en la sidejo de UFE. De unu jaro, okazis 22 ekzamensesioj : 72 kandidatoj por la 1<sup>a</sup> nivelo, 19 kandidatoj por la 2<sup>a</sup> nivelo, 1 kandidato por la 1<sup>a</sup> nivelo de la 3<sup>a</sup>, 4 kandidatoj por la faka parto pri pedagogio.

Tiuj rezultoj estas **nekontentigaj**. Tial FEI instigas ĉiujn kursyvidantojn, sisteme trapasigi la unuan nivelon al siaj lernantoj, fine de la kurso.

Raporto de la kasisto:

Enspezoj : 679 €

Elspezoj : 508,27 €

Pozitiva saldo : 170,73 €

En kaso je tiu tago : 5266,44 €

Nova sekretario : Ĵak Le Puil

Nova vicsekretario : Janine Dumoulin

Precizigojn pri la ekzamenoj en <http://esperanto.instituto.free.fr> (J.Le Puil)

## UFE ELDONAS SLIPARON PRI DAŬRIPOVA EVOLUIGO EN ESPERANTO

**K**adre de la programo de nia « Agendo 21 », nia komisiono laboras pri kompletigo de sliparo pri daŭripova evoluigo. La celo estas klarigi kio estas daŭripova evoluigo kaj doni konkretajn ekzemplojn kaj agadojn por vivi laŭ maniero kongrua kun protektado de la naturmedio, prizorgante la sociajn kaj ekonomiajn konsekvencojn. Ni verkas ĝin laŭ la vidpunkto de la okcidenta vivmaniero, do certe tio ne validas en ĉiuj landoj sed ankaŭ certe estas la plej malbona por la planedo laŭ la eluzo de naturaj fontoj kaj laŭ la poluo produktata. Ni esperas samtempe ke ĝi utilos por Esperantistoj el iu ajn lando de la mondo kiuj interesiĝas pri la temo kaj ke ni

ricevos kontribuojn pri mankoj aŭ eĉ kontraŭdiroj kiuj povus ekigi debaton en Esperanto.

La laboro estas ampleksa kaj certe neniam finota ĉar la temo estas tre larĝa kaj la mondo ĉiam evoluas kaj tiel aperigas kaj problemojn kaj novajn solvojn. Tial ni eldonis dosierujon por enmeti la slipojn, tiel ke ĝi ĉiam adaptiĝos laŭ la ampleksigo de la kolekto de la slipoj. Vidu bildon de ĝi ĉi-apude (ĝi estas mendebla ĉe la sidejo samkondiĉe kiel la alia versio de dosierujo, klasika, por 0,80 € krom sendokostoj).

Jen la listo de la temoj de slipoj ĝis nun



elpensitaj :

Kiam vi estas infano, Kiam vi estas studento, Kiam vi butikumas, Kiam vi elektas loĝejon, Kiam vi laboras, vojaĝas aŭ ferias, Kiam vi ĝardenumas, Kiam vi kuiras, Kiam vi estas hejme.

Ĝi certe estas kompletigebla kaj ne ĉiuj slipoj el tiu listo jam

estas pretaj. Pro tio ni serĉas volontulojn por kontribui kaj por relegi la faritan laboron. Se vi pretas kunlabori, bonvolu sendi retmesaĝon al [ufe-a21-pilotage@googlegroups.com](mailto:ufe-a21-pilotage@googlegroups.com).

B. Flochon

Agenda 21

## Prelegvojaĝo

# Raporto pri prelegoj kaj renkontiĝoj dum la turneo de HORI Jasuo kaj ARAI Toshinobu

**N**iaj japanaj amikoj tre sukcese prelegis en Lille, Thionville-Nilvange, Bourges, Clermont-Ferrand, Montpellier, Villeneuve d'Aveyron, Bordeaux, Libourne kaj Lunay. Hori Jasuo resume komentas.

Dank' al la bona organizo de S-ro Yves Nicolas kaj bonaj kontaktoj inter prizorgantoj, nia vojaĝo estis perfekte bonorda. Mi dankas al ĉiuj, kiuj akceptis nin kaj bonvenigis nin.

Prelegoj kaj kunvenoj estis bone organizitaj. Laŭ mia kalkulo, ni prelegis al 230 lernantoj (Lille 80, Libourne 50 kaj Lunay 100) kaj prelegis al kaj renkontiĝis kun 410 esperantistoj kaj civitanoj. Se okazos pli da prelegoj en lernejoj, estos pli bone.

Ni jam prelegis en la pasintaj du jaroj kun sukceso, pro kio ĉi-jaraj prizorgantoj pli pozitive povis proponi al lernejoj kaj civitanoj pri niaj prelegoj.

Amaskomunikiloj havis intereson pri niaj vizitoj. Antaŭ niaj vizitoj jam aperis anoncoj en diversaj lokoj. Kaj post niaj vizitoj en Lille, Thionville kaj aliaj lokoj, oni aperigis artikolojn, en

Clermont-Ferrand la loka radio elsendis intervjuon. Por Esperanto-filmo mi kontribuis.

Ni mem estas jam spertaj pri la prelegoj kaj pro tio ni pli bone povis plenumi la taskojn. Ĉiuj ĉeestantoj estis tre ĝojaj pro niaj prezentaĵoj kaj estis neniu, kiuj endormiĝis pro enuiĝo. Ĉiuj estis tre vigliĝintaj, precipe lernantoj estis tre entuziasmaj.

Miaj turneoj estis tre signifoplenaj ne nur por Esperanto sed ankaŭ por interkompreniĝo inter francoj kaj japanoj. Mi povis doni al francoj multajn informojn pri Japanio kaj reveninte hejmen mi verkis/os raportojn pri miaj vojaĝoj por japanoj kaj Arai montris/os fotojn al la publiko.

Iom da bedaŭro estis ekzisto de krokodilemaj "esperantistoj", kiuj parolis nur pri siaj aferoj, neglektante nin. Antaŭe mi opiniis, ke ĉiuj francoj tuj fariĝos lertaj esperantistoj dank' al la simileco de Esperanto kaj la franca lingvo, sed mi nun scias, ke tio estis mia erara antaŭjuĝo. Por lerni Esperanton, ĉiuj, ne nur japanoj, devas lernadi diligente kun celkonscio. Pro tio mi esperas, ke



En Nilvange niaj japanaj amikoj partoprenis en "Fête des Droits" (Festo de la rajtoj), laŭ invito de Forum des Citoyens kaj Espéranto-Thionville. Post manĝo de la tradicia (ne reĝa) kuko, tiuj, kiuj trovis fabon ne ricevis kronon, sed frugian ĉapon.

francaj krokodilemuloj pli serioze lernas Esperanton, okaze de niaj vizitoj. Se vi havos opiniinterŝanĝojn pri reklamo al civitanoj, vizitoj al lernejoj, maniero kontakti amaskomunikilojn ktp., tio pli progresigos la projektojn. Ekzemple, se oni povos fari komunan afiŝon, kiu estos uzebla en ĉiuj urboj, la efiko estos granda. Nun nur kapablaj kluboj faris ĝin, sed aliaj ne. Por la prelegantoj, vidi afiŝon kun sia foto estas agrable kaj donos pli da kuraĝo al ili. En la venonta jaro, mi volas veni al Francio denove, se francaj E-klubo akceptos min, ĉar mia vizito certe estas dediĉata al Esperanto-movado kaj interkompreniĝo inter la du landoj. Se eblos, mi volas akompani alian japanon por trejni lin/ŝin pri tiu afero. Reveninte hejmen, mi estas tre kontenta pro mia laboro kaj dankema al ĉiuj rilatantaj homoj. Salutante varme al vi, mi finas mian raporton.

HORI Jasuo

## Devenez membre du Conseil d'Administration d'Espéranto France !

Vous souhaitez avoir votre mot à dire sur les orientations stratégiques de l'association ? Proposer de nouvelles actions ? Critiquer les méthodes ou les activités menées ?

La meilleure manière pour faire entendre votre voix est de devenir membre du CA, pour les 2 années à venir. Vous participerez aux 3 réunions physiques annuelles (mai, septembre, janvier) et à la liste de discussion sur internet.

La date limite pour envoyer vos candidatures est le mercredi 07 avril 2010 (6 semaines avant l'AG 2010 à Kaiserslautern).

Merci d'adresser votre mini-présentation (5 lignes) incluant vos objectifs personnels et pour l'association à la secrétaire d'Espéranto-France à l'adresse ufe-estraro@googlegroups.com

# Projekto por revivigi la bibliotekon

Reordigo de la libroj, registro (Jean Lazertie registras la librojn)

**M**iloj da libroj vegetas sub tero en la kelo de La Ĉerizejo. Kvankam granda kaj grava laboro estis farita antaŭ kelkaj jaroj, ili dormas, jam de 40 jaroj, forgesitaj, forlasitaj, polvumaj, sen iuj ajn animoj por rilati, por konfidi. Ne malpravas kompari ilin al mortintoj en fosoj aŭ al malliberuloj.

Ni helpu ilin. Ili baldaŭ reestos bonaj amikoj kiuj certe helpos nin. Ili tre kapablas temi pri ĉio, ne nur pri lingvistikaĵoj aŭ komitataĵoj. Sur la bretoj ŝultra-ŝultre sidas dikaj libroj, freŝaj poezioj, malnovaj fremdaj revuoj, utopioj de hieraŭ por morgaŭ...

Veki la libron estas relative facile, ĉar 2600 librojn klasifikis Pierre Royer dum la jaroj 1960. Ni havas kompletan liston sur kajero kaj slipoj. Bedaŭre la libroj estas senorde miksitaj pro translokigoj, manko da spaco kaj de zorgo. Estas du etapoj por veki ilin :

1. Transkopi la libroliston en komputilon kaj legebligi ĝin en interreto.
  2. Reklasigi la librojn de bretoj al bretoj.
- Tiam, estos la libroj konsulteblaj, sed manko da spaco kaj malmulteco de ĉiuj tiuj malnovaj paperaĵoj ne ebligos prunti ilin. Pruntoprenoj estos konsentotaj nur per fotokopioj aŭ skanaĵoj.


La libroj estos nur surloke konsulteblaj, ekzemple dum kursoj, rondoj aŭ rendezue. Tiuj du etapoj kostos preskaŭ nenian monon, ĉar la bretoj kaj la libroj jam ekzistas. Printilo estos uzata por pluraj dekoj da paĝoj. La uzo de skanilo probable estos malgranda en la komenco. Necesos aĉeti grandajn kovertojn por protekti broŝuretojn.

Pluraj personoj ricevos klarigon kiel serĉi petatajn librojn (la vizitantoj ne faros mem) kaj re-enbretigi ilin !

La unua etapo jam finiĝis.

La dua bezonas brakojn, sed pro malvasteco ne eblas, ke ĉeestu pli ol 6 kruroj.

La klasado de 2600 libroj jam katalogitaj ne estos faraona laboro, kvankam malagraba pro manko de spaco kaj malmanko de nigra pariza polvo. Tiu etapo daŭros monatojn. Probable efika organizmaniero estos komence listigi la aktualan senordan sinsekvon kaj sekve, disbretigi post analizo. Multaj libroj aperas dufoje en la listo de la 2600. Vendi ilin ne enspezigus multan monon kaj ne liberigus multe la bretojn. Saĝa decido estos ilin konservi en alia loko.



Probable malmultaj personoj deziras legi tiujn antikvaĵojn, sed la legebleco de la libroj estos fidinda fonto de ĝenerala kulturo en la klubo kaj por kelkaj serĉantoj, profesoroj, ĵurnalistoj. Poste, pliaj etapoj estos farendaj.

3. Daŭrigi la katalogadon, ĉar pluraj pliaj miloj da libroj, broŝuroj, revuoj atendas ! Tiu laboro estas malrapida kaj malfacila, ĉar necesas iomete tralegi por klare vidi pri kio temas. Daŭros plurajn jarojn, ĝis estos ĉiuj libroj enlistigitaj!

4. Plia etapo (kiu ne ligiĝas kun la tria) estos la virtuala muzeo, kiel revita de André Albault en LME n-ro 570, p. 12-13. Tio estas konsulti la librojn per interreto. Ni ne tro revu, sed bona principo estos skani librojn, prefere ol fotokopii, por komenci ebligi tion. La strukturo de Esperanto tre faciligas la aŭtomatan laboron de komputilo por tiu celo.

Estus tre utile, ke kontaktoj estu kreataj kun aliaj E-aj bibliotekoj, por ricevi konsilojn. Certe ili konsentos interŝanĝojn pri niaj duoblaj libroj.

Kvankam la libroj ne diras ĉion, ili estas granda parto de kultura vivo. Niaj paperaj amikoj neniam forgesis nin, ni ŝuldas al ili pro tro daŭra miszorgado.

Niaj esperantaj libroj atendas nin.

Elbret. (Régis Fournier)

## FESTO ! FESTO ! FESTO !

**T**iel estis en 2009 kaj estis bona renkontiĝo. Ĉu vi memoras ? Do, jes, ja, FESTO okazos en 2010 !

FESTO 2010, la partopreninda somera renkontiĝo de JEFO, okazos en Tuluzo, de la 13a ĝis la 20a de aŭgusto. Estos karavano el IJS kaj BEMI pripensas organizadon de bicikla karavano ekde Atlantiko.

Pretas reta aliĝilo. Pli da informoj vi trovos sur la retpaĝoj de JEFO, i.a. la listo de la aliĝintoj.

<http://festo.esperanto-jeunes.org>



## Memoraĵoj el Irano

**N**i longe hezitis antaŭ ol aliri tiun landon ĉar ĵus misokazis prezidentaj balotoj kaj manifestacioj estas perfortege ĉesigitaj en la ĉefurbo. Ĉiuj niaj amikoj forte konsilis, ke ni ne iru tien. Antaŭ ol firme decidi, ni informiĝis ĉe tehranaj esperantistoj. Ili asertis ke ne plu estas danĝero. Ni ja ne estas aventuremaj kaj malprudentaj riskemuloj aŭ senkonsciaj pri danĝero, tute male. Kaj ni scias, ke amaskomunikiloj influas ĉies opinion. Ili plenumas sian taskon tie, kie okazas konflikto aŭ problemo - tio ne signifas, ke la tuta teritorio fajras kaj sangumas.

Ni facile eniris Iranon, post registrado de niaj fingrospuroj kaj kontrolo de niaj identigiloj. La tuto daŭris nur tridek minutojn. Tute ne samis por plurcent irananoj atendantaj eble de pluraj tagoj sur tapiŝoj ĉe la doganejo.



Ni denove ŝanĝis je horzono, 2h30 pli ol en Francio kaj ni plijuniĝis je pluraj jarcentoj ĉar ni estis en la kvara monato de la jaro 1388 ekde la dato kiam Mahometo fuĝis de Mekko por iri al Medino. La tiea kalendaro pli logikas, ĝi komenciĝas printempe, kiam vekigis flaŭro kaj faŭno, kaj ĝi finiĝas vintre, kiam ĉio velkas.

Nova lando, novaj kutimoj, nova lingvo kaj nova mono... En Maku, ni ŝanĝis 50 eŭrojn kaj ni ricevis dikan biletaron je 10 000 rialoj... ĉirkaŭ 740 000 entute. Ni sentis nin riĉaj, sed kiam



ni rigardis la prezojn en la urbo... ni nenion povis aĉeti. Kulpis la ciferoj en la persa, tute malsamaj al niaj hindaj ciferoj

trandonitaj de la araboj. Ni eklernis ilin survoje per legado de la rapideclimaj ŝildoj montrantaj ambaŭ versiojn. Sed ne finiĝis la malfacilaĵoj. Ni akiris rialojn, sed la valuto uzata en la ĉiutaga lingvo estas tomano, kiu ne konkrete ekzistas. Por ĉiu aĉeto, ni do devis demandi pri la prezo en la angla, la vendisto ofte respondis en sia lingvo; ni komprenigis al li, ke li skribu la pagendan sumon, kion li faris en tomanoj. Ni konvertis la tomanojn en rialojn (por pagi), poste en eŭrojn. Sekve, ni provis diferencigi la monbiletojn de 500 (ĉirkaŭ 0,15 eŭrocendoj) ĝis 100000 rialoj. Ankaŭ ekzistas ĉies ĉekoj je 1000000 (unu miliono da) rialoj uzablaj kiel ordinaraj biletoj. Sed ne tie finiĝis la afero. Post kiam ni finfine trovis nutraĵvendejon, ĉar vendejegoj kvazaŭ ne ekzistas, ĉiam eniris iu en la butikon, ne por aĉeti sed ja nur por rigardi nin, aŭ por angle demandi, ĉu ili povis helpi nin... Ilia kapablo en la angla ofte tre malaltis kaj ili ne komprenis la respondon. Ni fakte ofte uzis bazan gestolingvon. Kaj, ĉar neniuj plenigis nian prilingvan formularon en la persa, ni devis memlerni ĉiujn fundamentajn vortojn.

En Maku, post la landlimo, restis 838 km por bicikli antaŭ ol atingi Tehranon, la ĉefurbon. Komence, ni spertis traŭradon de dezerto en la plej baza senco. La temperaturo najbaris 50° en la suno kaj ne videblis ombreiro en tiuj grandaj



dezertaj ebenaĵoj. Tamen, post proksimume ĉiu deka kilometro troveblis arteza puto, kiu ebligis al ni malvarmiĝi kaj plenigi niajn akvo-botelojn.



En fina kalkulo, la devo kaŝi niajn brakojn kaj gambojn malebligis malhidratiĝon kaj protektis nin de la varmeco. Koncerne la vualon, iuj diris al ni, ke parto de irananoj ne deziras, ke eksterlandanoj provu simili al ili, ĉar ili ne havas alian elekton ol porti ĝin. Rose konservis sian kaskedon kun tuko sur la nuko, inkluzive en la tre religiema urbo Qom. Cirilo solidarece decidis porti identan vestaron, kvankam viroj rajtas porti ĉemizetojn sed ne ŝortojn.



En la tehrana metroo, virinoj disponas je vagonoj nur por si sed ili rajtas eniri



en iun ajn, ne la viroj. Naĝejoj estas apartigitaj kaj ekzistas altpalisaraj parkoj en kiujn nur virinoj rajtas eniri, kio rajtigas al ili demeti sian vualon.



Kiam ni atingis la ĉefurbon, ni devis enŝoviĝi inter la aŭtoj, la motorcikloj kaj la piedirantoj, kiuj ĉiuj moviĝis en ĉiujn direktojn samtempe. Motorciklon kondukas nur viroj kaj ili ofte veturas kontraŭdirekte aŭ sur trotuaroj. Ofte sidas tri aŭ kvar personoj sur motorciklo, memkompreneble sen kasko! La trafiklumoj utilas nur kiel ornamaĵoj.



La plej grandan malfacilaĵon ni spertis kiam ni volis piede transiri straton. Ni ofte atendis por gluiĝi al alia piediranto ŝoviĝanta inter la aŭtoj, kiuj neniam haltis kaj pasis je nur kelkaj centimetroj for.

Jen iu el la multnombraj paradoksoj de tiu lando. La irananoj dolĉanimas kiel ŝafoj kaj tre helpemas, sed en veturilo ili fariĝas tigro alĵetiĝanta al ĉio pasanta kaj malbridiĝas per hupado.



Preskaŭ ĉiuvespere, ni estis spontane kaj senpage gastigataj kaj nutrataj ĉie, kie ni haltis, foje eĉ dum unu semajno. La iranaj apartamentoj tre grandas, pro la simpla motivo ke ofte ne enestas lito nek tablo nek seĝoj, nur grandegaj tapiŝoj kovrantaj la tutan ĉambron kun kusenoj ĉirkaŭe. Foje estas brakseĝoj kaj sofoj. Same kiel en Turkio oni sensuiĝas je la eniro kaj oni paŝas nudpiede, escepte en la turkeca neceso, kie atendas onin grandaj plastaj pantofloj.



Kiam venas la manĝotempo, oni malfaldas tukon el plasto, en kiu kuŝas platpanoj, sur iun el la grandaj tapiŝoj en la hejmo aŭ en la korto. Oni manĝas per kulero kaj oni tranĉas per forketo, oni ne uzas tranĉilon. La deserto konsistas el sezonaj fruktoj, melono, banano, vinbero, pomo aŭ kukumo kun salo. La iranaj fruktoj ne estas maturaj, irananoj ŝatas ĉion forte vinagritan kaj acidan. Por kompensi la acidecon ili trinkas duĝ, t.e. jogurton kaj salon kun gasa akvo.



En Esfahano, ni frandis glaciaĵojn je roza aŭ safrana gusto... Pri teo, oni enbuŝigas sukeron kaj oni sekve trinkas. Kiam finiĝis la manĝo, oni viŝas la platan tukon kaj oni refaldas ĝin kun la pano ene. Poste, siesto ĝis la 17a horo kaj familia promeno en parko. Surstrate, ni paŝis en neniun hundan

fekaĵon pro la simpla fakto ke ni neniam vidis hundon en la urboj. Ekde Turkio ni tamen vidis multajn ekster la urboj, trafikviktimojn vojflanke kuŝantajn en pli-malpli putra stato. Ni foje vidis ĝis po kvar tage.



Post Tehrano, ni opiniis la dezerton finita, kia eraro! Temis nur pri la komenco, sed nun tute ne plu troveblis akvopunktoj. Tiam helpis la ŝarĝveturilaj ŝoforoj haltigante nin por provizi nin per boteloj da glacia akvo. Neniu ombro kie halti por tagmanĝi. Ni iam devis ŝirmiĝi sub ponto superanta la vojon, ĉar estis nenia ombreto jam de dekoj da kilometroj.



Polvo jam de longe kroĉiĝis al niaj vestoj, nia gorĝo sekis, niaj lipoj senĉese senhaŭtiĝis. Eĉ ne unu pluvtago de du monatoj, ni trafis nur unu dezerto-temposton. En la malproksimo, ni vidis blankan polvospuron vertikalan kaj, dum momenteto, polvonebulo kovris ĉion, flugis dornarbustoj kaj kroĉiĝis al niaj radoj kaj post minutetoj jam forvaporiĝis la tempesto.

En Qom, tre religiema urbo, ni vidis la domon de Ĥomejni nur de ekstere kaŭze de siesto-tempo ĝis la 16-a. Kelkajn fotojn de la moskeo, en kiun ni ne rajtis eniri sen oficiala permeso de la religiaj instancoj kaj ni pluiris al Esfahano. Ni pasis je kvindek kilometroj de Neauphle le Château, ne la franca